JAZYK VŠESLOVANSKÝ A ESPERANTO.

Napsal *Jos. Krumpholc.**)

»Dobro čím obecnější,
tím jest lepší.«
J. A. Komenský.

Po celé tisíciletí — od IX. již století — pozorovati u Slovanů vedle snah odstředivých, z vrozené prý Slovanům nesvornosti plynoucích, i hnutí dostředivé, jehož výrazem nejvýmluvnějším jest neutuchající úsilí o jednotný jazyk slovanský. Od církevní staroslovanštiny z IX. století až po návrh Dra Herm. Jirečka v loňské »Osvětě«**) vyskytlo se pokusů takových a návrhů neméně než deset, ale ani jedinému z nich nepodařilo se »vrátiti Slovanstvu rty jedny . . .«

Přiznejme se: Lze-li který jazyk nazvati dnes slovanským, všeslovanským, je to posud — němčina. Německy jednalo se na pražském sjezdu slovanském r. 1848, jako i na moskevském r. 1867; německy (a latinsky) psali svá »panslavistická« díla Dobrovský, Kopitar, Miklosič i Jagič, německy napsal Kollár hlavní svůj spis o vzájemnosti slovanské, jako i Šafařík své dějiny slovanských řečí a literatur, a Palackého dílo životní — Dějiny národu českého — vyšlo napřed (r. 1836) německy a teprve r. 1848 česky. Německé byly i prvé naše učebnice jazyků slovanských, a kdo chce u nás čísti jazyky slovanské a cizí vůbec, musí napřed znáti — německy, neboť slovníků svých pro slovanské a j. řeči posud všech nemáme. Naši učenci mluví k světu francouzsky, latinsky a zase německy, a hlavně německy, německy vychází i sám Archiv slovanské filologie atd., atd. A jak tomu mezi učenci, tak a nejinak i mezi ostatními. Jednacím jazykem mezinárodních sjezdů (i slovanských) stále a stále zůstává jak pro Němce tak i Čechy, Rusy a ostatní Slovany němčina a to i v ta-

*) Veškerá práva vyhražuje si redakce.

**) »Osvěta«, 1908, str. 97—99.

kových spolcích, jako jest na př. Svaz katolického učitelstva v Rakousku, uznávající výslovně národnostní rovnoprávnost, t. j. národnostní autonomii jednotlivých svazových spolků.

Nuže — je či není všeslovanskou řečí němčina?

Ano, tak daleko to došlo, že sami předáci naši národní uznávají, že každý náš vzdělanec musí uměti německy přes to, že se tím, jak naříká už Puchmayer (1804) i Palacký (1852) »den co den víc a více odčešťujem, odslovaňujem, odnárodňujem.«

Takový jest skutečný stav, to je prostý fakt. Avšak, co jest, nemusí být i v budoucnosti . . .

Jak tomu tedy odpomoci?

Příklad dřevních Řeků, Italů za Dantea, Němců za Luthera atd. a snad i snahy o utvoření nového, latiny snadnějšího jazyka universálního, jež v XVII. stol. všechnu téměř zaujaly veřejnost, nevyjímajíc ani našeho Komenského, nezůstaly asi bez vlivu ani na Slovany, rodem, duchem i jazykem sobě tak blízké, jako jsou a byli na př. Sasi, Bavoři a Dolnoněmci, nebo Toskánci a Siciliáni, mluvící různým nářečím, píšící však společným dnes jazykem všeněmeckým a všeitalským.

A neplatí-li domněnka naše o jiných, tož velmi pravděpodobně platí alespoň o prvním hlasateli společného jazyka slovanského, o Jiřím Križaničovi († 1676), jenž už v letech šedesátých XVII. stol. přišel ku přesvědčení, že Slovanstvo může se sjednotit na půdě nějakého »společného jazyka«, o jehož upravení a zdokonalení po 20 let dumal a pracoval, vybíraje takové sklony a koncovky, které mají ráz společný, t. j. mnohým našim nářečím vlastní, aby to byl jazyk všem Slovanům pochopitelný a by se jím překrátily i spory národní. Tak vypracoval Križanič jazyk, jenž slovníkem těsně přiléhá k ruštině, mluvnicí však ke Križaničově mateřštině — charvátštině. Přes to Križanič — a to je pozoruhodné vzhledem k naší domněnce — nazývá jazyk ten »všeslovanský« ruským, ježto »nespravedlivě« prý »nazývá se slovanským (slovinským) jazyk, kterýmž píšeme knihy a konáme služby Boží. Má nazývati se »ruským«, neboť »všechny slovanské národnosti vzešly z ruské«.*)

Po 200 téměř let ležely všeslovanské úvahy Križaničovy v rukopisech a tak teprve v XIX. věku dostává se otázka jazykového spojení Slovanů na denní pořádek.

*) A. S. Budilovič-Hejret „O všeslovanském jazyku“, str. 14.

R. 1863 J. Kollár, hlasatel literární vzájemnosti slovanské (jíž rozuměl vzájemné kupování a čtení knih všech slovanských nářečí), žádá, aby každý (vzdělaný) Slovan rozuměl každému mluvícímu Spoluslávu a každé slovanské knize a by proto každý znal alespoň čtyři hlavní nářečí slovanská: ruské, illyrské, polské a československé. Krásná zajisté myšlenka, ale má jednu nemalou vadu: je nesplnitelna, neboť kromě učenců neposvětí zajisté nikdo několik let života poznání tolika jazyků — a tak zůstala idea Kollárova podnes pouhou myšlenkou a nepochybně i navždy zůstane — alespoň v původní své formě. (Pokračování.)

ESPERANTISMO KAJ PACIFISMO.

Du vortoj neklaraj por multaj homoj, du ideoj altsignifaj montrantaj du tre parencajn modernajn movadojn, *skizantaj novan internacian formacion socian.*

Ni montru tie ĉi plej mallonge kiel esperantismon klarigas la kreinto mem de esperanto, doktoro Zamenhof, kaj la klarigon pri pacifismaj ideoj ni serĉu en la literaturo pacifisma.

Kiel komprenas dro Zamenhof la vorton esperantismo (li diras: interna ideo de esperantismo), ni eksciis el liaj paroladoj faritaj precipe en la kogresoj esperantistaj en Boulogne-sur-mer 1905, en Genève 1906 kaj en Cambridge 1907. La unua kongreso montris, kion signifas esperantismo en rilato praktika: Esperantisto estas ĉiu, kiu uzas la lingvon esperanto por kia ajn celo, ĉu por celoj praktikaj, ĉu por amuzo ĉu eĉ por celoj malnoblaj kaj malamaj. Alia kompreno estas afero tute privata, pro kiu esperantismo ne respondas. Sed tio tute ne signifas, ke oni devas rigardi esperanton kiel aferon pure praktikan, kiu devas servi ekz. sole por celoj komercaj k. s.

La kreinto de esperanto pli ŝatas — kaj certe prave — la duan, pli *gravan flankon* de internacia lingvo, flankon *idean*, kaj *tiu ideo estas por li frateco kaj justeco inter la popoloj.* Por li, esperantistoj estas homoj, kiuj pere de helpa lingvo internacia esperanto, sekve sur neŭtrala fundamento de lingva interkompreniĝado, *penas atingi internacian justecon, interkonsenton kaj fratiĝon por krei grandan rondon familian.* Esperanto

devas fariĝi ponto inter popoloj, kiuj ne devas reciproke altrudi al si gentajn apartaĵojn.

»Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.«

En la dua kongreso dro Zamenhof rimarkigis, ke multaj esperantistoj ŝatas esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas korpojn kaj cerbojn, sed tial, ke *ĝi alproksimigas iliajn korojn.*

Tiom pri signifo de esperantismo kaj esperanto.

Pacifisto estas homo penanta anstataŭi la militon per juĝantaro, kiu solvos konfliktojn internaciajn. *Pacifismo* estas aro de ideoj, karakterizantaj pacifistojn, kiuj zorgas pri rajtoj de homo, rajtoj de nacioj, rajto internacia, eldono de internacia ekonomia leĝaro kaj kiuj akcentas la ideon de infernacia federacio de regnoj, de arbitracio k. a.

Al tia klarigo de ambaŭ ideoj venos ĉiu, kiu atente observas la fizionomion kaj sekvas la progresadon de ambaŭ movadoj en ilia historia kaj samtempa evolucio kaj sincere penas kompreni ambaŭ tendencojn.

Ambaŭ movadoj estas esence *movadoj internaciaj. Ilia celo* estas lingva (ĉe esperantistoj), idea kaj politika (ĉe pacifistoj) *unuiĝo de popoloj, atingota per iliaj libereco, egaleco, frateco, justeco kaj per akcepto de iliaj rajtoj.*

Sukcesa kreskado de esperantismo kaj pacifismo dependas de *la propagando.* Per ĝi ambaŭ movadoj gajnas siajn vicojn de sindonaj partianoj. Tiujn ĉi oni serĉas inter maturaĝaj kaj ofte tre influaj personoj, sed *la ĉefa peno propaganda turnas sin nun al la junularo kaj lernejo.* La junularo, jen estas la plej proksima generacio, transprenontoj kaj daŭrigontoj en nefinita peno de la pli maljunaj. Propagandaj rimedoj estas precipe paroladoj, kursoj, preso, premiaj konkursoj pri bonaj verkoj, regulaj kongresoj naciaj kaj internaciaj, ekspozicioj, bibliotekoj, muzeoj k. a. Iliaj naciaj societoj laboras inter samnacianoj, internaciaj institucioj propagandas la ideojn internacie.

Oni devas distingadi *kelkajn nuancojn de pacifismo.* Pacifismo revolucia, Hervé'a (plibone nomata: antimilitarismo), pacifismo socialista, pacifismo evolucia, scienca, jura (nomata de Hervé'anoj kaj socialistaj pacifistoj pacifismo de burĝaro) kaj pacifismo katolika. La pacifismo evolucia estas reprezentata

per internacia oficejo de la paco en Bern, kaj per siaj ĉiujaraj universalaj kongresoj pacifistaj kaj ĝi estas tiu movado, kiun oni ordinare nomas per la vorto pacifismo. Ĝi estas ja la plej granda kaj forta. (Fino.)

IDEO DE J. A. COMENIUS PRI LA LINGVO UNIVERSALA.

Originale verkis *Jos. Krumpholc.*

(2. daŭrigo.)

Krom motivoj internaj *Comenius* estis gvidata al la ideo de nova, artefarota lingvo universala, ankaŭ per kelkaj motivoj eksteraj.

Oni scias, ke en la tempo de Comenius oni multe skribis kaj parolis pri la ĥina skribo kaj ĝiaj signoj, per kiuj interkompreniĝas Ĥinoj de diversaj idiomoj, legante ilin ĉiu per sia lingvo tiel, kiel ekzemple ni Eŭropanoj legas ĉiu per nia lingvo — alie Bohemo, alie Germano, Franco k. t, p. — la ciferojn.

Tio estis la kaŭzo, ke kelkaj instruituloj penadis pri simila skribo universala almenaŭ por Eŭropanoj.

Comenius sciis pri la skribo ĥina, pri kiu li skribas en *Via lucis* kaj ankaŭ en *Linguarum methodus novissima* kaj li laŭdas ĝin, ke ĝi ebligas al homoj diverslingvaj, por kiuj lango estas senvalora, kune interparoli almenaŭ per la mano (skribo); sed malgraŭ tio Comenius pli multe ol universalan skribon kaj penadon pri ĝi ŝatis celadon al universala *lingvo.* Li skribas ekzemple al sia angla amiko *S. Hartlib* 12. VI. 1647: »Via penado pri la komuna skribo de ĉiuj nacioj kaj lingvoj min tre ekinteresis, kvankam mi de ĝi tiom ne esperas, kiom mi dezirus. Milfoje estus pli bone posedi *lingvon* novan...«

Alia motivo ekstera, pro kiu Comenius okupis sin per la ideo de la lingvo universala, estis certe ankaŭ tio, ke en lia epoko la problemo pri *nova* lingvo universala fariĝis preskaŭ *moda* problemo, per kiu okupis sin ne sole la instruituloj, kiel *Dalgarno, Helmont, Leibniz, Mersenne, Le Maire, Vives, Wilkins* ktp., sed ankaŭ la regantoj, kiel Habsburganoj: imperiestro *Ferdinando III., Leopoldo I.* ktp.

Estas kompreneble, ke Comenius, »viro de sopiroj«, kiu pri si mem skribis, ke lin tiel la naturo formis, ke eĉ

la plej bagatelaj esploretoj *pri kiu ajn vero* estas por li kiel multekostaj ŝtonoj, ne povis ne vidi kaj ignori, precipe dum sia restado en London (en la jaroj 1640—1641), tiel grandan kaj gravan movadon, kiun ankaŭ la biblio mem, al li tiel aŭtoritata, profetas kaj sanktigas per la vortoj, ke venos la tempo, kiam Dio »kunvenigos ĉiujn naciojn kaj lingvojn« (*Izai.* LXVI, 18.), ke »li aliigos al la nacioj la lipojn, por ke ili estu puraj kaj adoru ĉiuj la nomon de Dio kaj servu al li per unu brako« (*Sof.* III. 9.), kaj »estos Dio reĝo super la tuta tero, Dio unu (sola) kaj la nomo lia unu« kaj »la tuta tero fariĝos kiel ebenaĵo« (*Zach.* XIV, 10*), kaj ke »oni ne vidos plu popolon kruelan (barbaran), popolon kun profunda lingvo ne aŭdita kaj fremda, kiun oni ne komprenus« (*Izai.* XXXIII, 19.), ke revenos al la nacioj lipoj elektitaj kaj ke tiel estos kunvenigitaj el la Babela disirigo (*Mos.* XI, 1., 7., 8.), ĝis Dio komencos konstrui kaj montri Sionon en sia gloro . . .

Fine certe ankaŭ la multeformaj malhelpoj kaj konfuzoj de homara reciprokeco, devenantaj el la multego, malfacilaĵoj kaj neperfektaĵoj de ĉiuj lingvoj — sekve ankaŭ de la lingvo latina — krom la ĥiliasmo (kredo pri la miljara regado de Kristo antaŭ la fino de la mondo), direktis la penadon de Comenius al la ideo de artefarota lingvo universala, pli facila ol estas ĉiuj lingvoj konataj, por ke oni povu ĝin prilerni sen perdo de la tempo kaj objektoj, kaj per kiu povu interkompreniĝadi ne sole instruituloj, sed kiun povu ankaŭ kiuj ajn nacioj — ankaŭ tro nekleraj — facile plenlerni.

Ĉar la lingvo latina ne estis tia, Comenius opiniis, ke restas ninio alia ol *krei novan* lingvon universalan. (Daŭrigo.)

INTERNACIAJ PAGOJ.

Speciale por »*Český Esperantista*« boheme verkis *JUDr. Jos. Burger.***)

Rapida disvolviĝo de transportiloj kaj de mona cirkulado, tiuj du plej signifaj ekonomiaj faktoj de nia epoko, kaŭzis neatenditan kreskon de internaciaj ekonomiaj rilatoj kaj naskiĝon de l' ekonomio tutmonda.

*) Via lucis XIX, 19.

**) Represo aŭ traduko de tiu ĉi artikolo estas permesata se oni citas la nomon de la aŭtoro kaj la gazeton »Český Esperantista«. Laŭeble oni sendu al ni tri ekzemplerojn. *Rim. de la redakcio.*

En 1840 estis sur la tuta terglobo sole 8641 km da fervojoj, en la fino de 1905 oni taksas la tutmondan fervojan reton je pli ol 900.000 km. La grandeco de komerca ŝiparo en 1842 estis mezurita per 6,763.000 tunoj, en 1905 trairis oceanojn vaporŝipoj portintaj 29,963.400 tunojn kaj velŝipoj por 6,037.500 tunoj. Se oni kalkulas, por proporciigi la rapidecon, vaporŝipan tunon egalvaloran al 3 tunoj de velŝipo, do montras la ciferoj kreskon dum duono de jarcento de 6,763.000 al 95,927.000 tunoj transportataj jare sur ŝipoj. Sole se oni memoras tiujn ciferojn kaj samtempe analogian disvastiĝon de vojoj, de rivera navigado, de telegrafoj, kabloj kaj telefonoj, oni ne estas surprizataj per tio, ke internaciaj interŝanĝoj de komercaĵoj, kiuj dum multaj jarcentoj sole malrapide disvolviĝadis, kaj en 1850 elkreskis ĝis 8000 milionoj Sm, en la fino de la 19. jarcento valoras 40.000 milionojn Sm, sekve ke ili kvinobliĝis dum 50 jaroj. Sed en tiu nombro ne estas enhavita movado de valorpaperoj el unu regno en la alian. Por imagi ĝin sufiĉas noti la ŝuldojn de ĉefaj ŝtatoj eŭropaj, kiuj en Anglujo valoras 0'75 miliardojn £, en Francujo 30 miliardojn fr., en Germanujo 20 miliardojn Mk. (regno kune kun unuiĝintaj ŝtatoj), en Rusujo 8 miliardojn da rubloj, en Aŭstrio 15 miliardojn K, en Italujo 13 miliardojn £. Se oni rememoras, ke titroj de ŝtataj ŝuldoj plejparte, tre ofte eĉ ekskluzive, estas lokitaj ekster la limoj de sia patrujo, kaj ke simile estas ĉe ŝuldoj komunumaj, pruntoj de grandaj entreprenoj kaj akcioj, oni vidas, ke internacia movado de valoraĵoj kondiĉita per pagado de rentumoj kaj dividendoj kaj per amasigado de efektoj ne tre malsuperas internacian komercon pri komercaĵoj. Al interŝanĝo de komeraĵoj kaj de efektoj aliĝas interŝanĝo de agoj (ekz. transportoj de enlandaj fervojoj kaj ŝipoj je profito de la fremdlanda komercaĵo, komisiaj servoj de la enlanduloj por la eksterlimaj komitentoj) kaj fine diversaj aliaj kaŭzoj hazardaj de internaciaj pagoj, ekz. transdono de heredaĵo, elmigrado, militaj kompensaĵoj k. s. Rilato de la sumo de ĉiuj pagoj, kiuj devas pro kaŭzoj ĵus montritaj en iu momento enflui ŝtaton, kun la sumo de pagoj, kiujn en la sama momento ĉiuj entreprenoj de la sama ŝtato devas fari al fremdlando, estas internacia bilanco de pagoj de la ŝtato en tiu momento, kaj oni nomas la bilancon aktivan aŭ pasivan laŭ tio, kiaj pagoj superas. Internacia komerca bilanco rilatas sole pagojn kaŭzitajn per interŝanĝo de komercaĵoj, bilanco de la efektoj sole pagojn kaŭzitajn per movado

de la valorpaperoj, per pagado de dividendoj kaj rentumoj; estas evidente, ke ambaŭ estas sole partoj de la bilanco de pagoj, kaj ke oni ne povas juĝi laŭ pasiveco aŭ aktiveco de unu el ambaŭ pri aktiveco aŭ pasiveco de la internacia bilanco de pagoj. (Daŭrigo.)

PROGRESISMO KAJ KONSERVATIVISMO.

Pensoj en nuna momento.

La socio vivas per firma regularo kaj daŭras firme sole tiam, kiam ĝi transformiĝas laŭ ŝanĝemaj bezonoj de la tempo. En tio absolute ne estas ia kaŭzo reala por naskiĝo de du specialaj partioj, partio defendanta nunan staton kaj partio celanta ŝanĝojn. Sed homa naturo tamen kondukas al tiuj du ĉefaj partioj, kiujn ni kutimiĝis nomi konservativa kaj progresema. Estas kompreneble, ke homoj volas vivi laŭ la vivmaniero de siaj antaŭuloj. Potenca sinjoro, kutimo, amas malnovajn regularojn, ĉu bonajn ĉu malbonajn. Sed ne malpli natura estas la fakto, ke la enhavo de la vivo transformiĝas, ke al malnovo aliĝas novo, kaj sekve ke oni devas elekti inter ili. Se la elekto estus ĉiam racia, evolucius la socio iom post iom, sen salto, sen interrompo. Sed homoj ne estas tiel raciaj kaj logikaj. Unuj volas tutforte teni la malnovon aligante nenion novan, aliaj serĉas ĉiuforte la novon nepardonante la malnovon: naskiĝas nekritikema konservativismo kaj nekritikema progresismo. Per kontraŭpuŝo de ambaŭ naskiĝas revolucio, dume la socio bezonas sole reformojn. Tiel per reciproka nekritikemeco fariĝas el konservativuloj absolutistoj, el progresemuloj anarĥistoj, radikalismo kaj reakcio maltrankviligas la socion. La vera konservativismo devus defendi sole bonajn fortojn sociajn, ne *ĉiujn* iliajn rezultaĵojn, vera progreso devas forigi iliajn netaŭgajn rezultaĵojn, sed ne pereigi la fortojn. Novajn neatenditajn fortojn sociajn oni ne trovos per progreso ia ajn.

Do la du ĉefajn ideajn tendencojn kaj sekve la du partiojn, konservativan kaj progreseman, ni trovas ĉiam kaj ĉie sub diversaj devizoj. Ili respondas al du ĉefaj bezonoj de socia vivo, nome bezono teni firman regularon kaj transformi ĝin malrapide, racie kaj praktike. Konservativismo estas esence

dogmatika, progresismo estas kritika kaj filozofia. Partio konservativa kiel »beata possidens« tre ofte bazas sur potenco, la progresema en kritiko. Sed en si mem la rilato de ambaŭ partioj ne devus esti malamika. Kontraŭe ili devus komplementi sin, kiel kelkaj koloroj komplementas sin je blanka lumo. Kontraŭstaro de ambaŭ estas sole intertempa, ĝi daŭros sole dum la socio ne interkonsentos pri la fundamentoj de sia morala kaj racia vivo. Se oni interkonsentus pri tio, la rilato de ambaŭ partioj estus simila al rilato de supra kaj suba parlamentoj en konstituciaj ŝtatoj. *Dr. Stan Kamaryt.*

LA REZULTATO DE MIA PACIGA ENTREPRENO.

Raportas kaj al ĉiuj bohemaj esperantistoj prezentas

Dr. A. Batěk.

(Daŭrigo.)

Tiel ekzemple, kiam ŝajnis al ili, ke iu bohema esperantisto fariĝis influa kiel korespondanto de fremdaj gazetoj, ili skribis al la redakcio petante, ke el Bohemujo estu akceptataj sole »oficialaj sciigoj.« Tiel okazis, ke la fremdlando antaŭe pri Bohemoj informata, ĉesis pri ili paroli, ĉar sinjoroj »oficialuloj« mem ne sufiĉis por raporti al ili kaj eĉ estis por tio tro malagemaj kaj ankaŭ neinformitaj. Simila »oficiala« enmiksiĝado estas ankaŭ videbla sur ĉiuj aliaj flankoj. Kiam s-ro *Riegel* faris en Praha kurson, tiam, kvankam ĉio estis farata publike antaŭ ĉiuj membroj de la klubo, la klubo esprimis al li anstataŭ la dankon la indignon, ke li ne anoncis la aferon oficiale. Kiam li kontraŭ tio protestis, li estis el la klubo eksigita sen cito da motivoj. Simile tiuj ĉi sinjoroj kuraĝis enmiksadi sin en la laboron de la membroj eksiĝintaj el la klubo. La eksiĝintaj membroj vidinte nome, ke ĉiu libera laboro en la Unio estas neebla, laboris ekster ĝi. Ilia laboro ĉie rimarkebla montris sin precipe en la ekspozicio*), kies komitato promesis oficiale inviti la Dresden'an kongreson por viziti la ekspozicion de Praha. La partianoj de s-ro *Kühnl* antaŭe kontraŭstaris tiun ĉi inviton, sed, kiam ili vidis, ke la afero sukcesas, ili iris en la komercan ĉambron kaj tie ili proklamis, ke sole ili estas rajtigitaj por oficiala invito kaj en la gazetoj ili proklamis la antaŭan laboron kiel sian propran. Vere per tio la afero estis sole prokrastita, ĉar la komerca ĉambro estis baldaŭ informita pri ilia agado, sed jam tiu ĉi prokrasto sufiĉis, por ke la kongreso akceptu antaŭe la viziton de Berlin. Ankaŭ la malutilo kaŭzita per malsaĝa fieremo. Kaj per tiu ĉi ridinda superiĝemo estas plena la historio de la klubo de Praha.

---

*) La ekspozicia komitato de la Komerca kaj industria ĉambro en Praha eldonis kaj dissendis multajn milojn da esperantaj flugfolioj kaj promesis ankoraŭ eldoni la esp. gvidlibron, inviti aparte eminentajn esperantistojn kaj korporacie la kongreson viziti la ekspozicion, sed tiujn ĉi promesojn ĝi rifuzis plenumi post la intervenuo de la Unio. *Rim. de l'redakcio.*

5. Mi devas do repreni ankaŭ miajn vortojn kvazaŭ estus eraro la fondo de la Asocio, ĉar efektive tio estis la sola helpo kontraŭ la ruinigo, per kiu minacis la Unio la tutan boheman esperantistaron. Kiel noblaj estas principoj de la Asocio kompare kun tiuj vastigataj en la Unio, estas videble jam laŭ tio, ke, dume en la Unio estis elpelitaj ĉiuj membroj, kiuj eĉ iomete ekstaris kontraŭ la ĉefa direktantaro, en la lingvan komitaton de la Asocio estis proponita ankaŭ s-ro *Kühnl*, respekto, kiu vere montras la noblecon de la kontraŭuloj de s-ro *K.*, sed kontraŭ kiu estas necese energie protesti, ĉar poste estus senfinaj partiaj bataloj, burokratia ordonado kaj suspektado. — — — (Daŭrigo.)

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Denis pri Husanoj. Eminenta franca sciencisto *Ernst Denis* (nask. 3. I. 1848 en Nîmes), aŭtoro de tri grandaj kaj belegaj verkoj pri bohema historio (Huss et la guerre de Hussites, 1878; Fin de l' indépendance bohême, 1890; La Bohême depuis la Montagne Blanche, 1902) aspiris la titolon de doktoro de sciencoj en Paris'a universitato per sia verko pri Hus kaj husanaj militoj. La doktoraj ekzemenoj estis akompanataj per publika diskutado. La verko de juna (29-jara) sciencisto kaŭzis veran miregon inter maljunaj ekzaminantaj profesoroj en la universitato, ĉar malmulta el ili konis pli detale la historion boheman. Tiun doktoran ekzamenon alestis bohema inĝeniero L. Staněk, kiu notis jenan interesan okazaĵon: Unu el la profesoroj diris al Denis: »Ĉu vi scias, sinjor'kandidato, ke vi estus estinta certe forbruligita, se vi estus defendinta la aferojn husanajn sur tiu ĉi loko en la XV. jarcento, kiel vi faras hodiaŭ?« Denis spritplene respondis: »Mi ankaŭ scias, ke mi dankas al tiuj kuraĝaj Husanoj kaj al iliaj venkintaj armiloj pro tio, ke mi ne estos hodiaŭ forbruligita«. La respondo, per kiu Denis montris, al kiu la homaro dankas la liberecon de konscienco kaj esplorado, kaŭzis grandan kortuŝon de multenombre kunveninta aŭdantaro. *Bšk.*

Karel Emanuel Macan, instruisto en la blindulejo de Klár en Praha, bohema muzikkomponisto kaj fervora propagandanto de esperanto inter blinduloj, atingis la 50-an jaron de sia vivo. Macan naskiĝis la 25-an de decembro 1858, li studis ĥemion en teknika lernejo en Praha, sed blindiĝinte (1877) li forlasis teknikajn studojn, absolvis orgenan lernejon kaj kurson por instruistoj de blinduloj kaj fariĝis (1891) instruisto en la blindulejo de Klár en Praha. Inter liaj muzikaj komponaĵoj estas unu meso, fortepiana trio, arĉa kvarteto, melodramo Amarus, ĥoroj por viroj kaj por virinoj, 43 kantoj (eldonitaj en 8 kajeroj), kelkaj kantoj por infanoj (2 kajeroj) k. a. Per siaj verkoj li atingis ankaŭ premion de Bohema Akademio (1891). Por la biblioteko de blinduloj li transkribis per Braille'a skribado grandegan vicon da bohemaj kaj esperantaj verkoj, inter ili ankaŭ lernolibron kaj vortarojn esperantajn. En 1904 Macan komencis instrui esperanton al zorgatoj de la blindulejo de Klár kaj de tiu tempo li faris tie 8 kursojn. Li ankaŭ kun siaj gelernantoj ekligis la rilatojn kun ĉiulandaj esperantistoj-blinduloj kaj fervore laboras en esperantista movado inter blinduloj. Por blinduloj faris Macan tre grandan laboron, kiun plene ŝati povas sole tiu, kiu scias, kiel klopode la blinduloj laboras. En la 50-jaro de sia vivo Macan estas tre vigla laboranto kaj ni deziras al li multjaran

vivon en plena sano por plua laboro. Precipe ŝatinda estas lia laboro farita por bohemaj blinduloj, por kiuj ne ekzistas presitaj libroj kaj gazetoj bohemaj, por kiuj sole malmultaj amikoj transskribas la publikaĵojn per Braille'a skribado, por kiuj la plej granda nombro da libroj estis transskribita de Macan. *V. Riegel.*

Komuna kongreso de bohemaj partianoj de esperanto, pacifismo kaj Libera penso okazos en Praha dum la venonta Pasko, la 10-12an de aprilo 1909. La kongreso konsistos el tri sekcioj, kiuj antaŭtagmeze faros diskutojn ĉiu aparte kaj vespere en komunaj publikaj kunvenoj manifestos por komunaj, kulturaj kaj tuthomaraj, celoj. La prepara komitato, konsistanta el membroj de *Bohema asocio esperantista, Pacifista sekcio de »Jednota Komenského« kaj Bohema sekcio de »Libera penso«*, baldaŭ eldonos detalan programon. En programon de esper. sekcio estas ĝis nun akceptitaj paroladoj de s-roj Alferi, dro Batěk, Bouška kaj dro Kamaryt (kiu ankoraŭ volus esti akceptita kiel parolonto, sciigu la temon, pri kiu li volus paroli, al la redakcio de »Čes. esp.« antaŭ la fino de januaro). La detalaĵojn pri tiu ĉi granda manifestado de amikoj de la progreso ni publikigos en la numero venonta. *Bouška.*

Esperantista movado inter Bohemoj (Kroniko). En la tempo antaŭ Kristnasko la propagando de esperanto estis farata preskaŭ en ĉiuj gravaj kaj en multaj malpli gravaj lokoj en Bohemujo kaj Moravio. Paroladoj, kursoj, ekspozicioj, gazetaj artikoloj pri esperanto estis multenombraj kaj certe ne senrezultaj. Ne povante citi la vicon da publikaj kursoj mi almenaŭ notas la kursojn akceptitajn en programon de kelkaj lernejoj: en lernejo de modernaj lingvoj en Praha (instruas prof. Farník), en knabina industria lernejo en Písek (f-ino Křivancová), en blindulejo de Klár en Praha (s-o Macan); krom tio rimarkinde estas, ke en la gimnazio en Kroměříž estis oficiale permesita la kurso por gimnazianoj (instruis s-o Krumpholc). Estis fonditaj ankaŭ kelkaj novaj societoj esperantistaj (en Jevíčko, Hostomice, Jaroměř, Praskačka k. a.) kaj kelkaj estas fondataj. La gazetaro bohema estas plejparte favora al esperanto kaj oni povas preskaŭ ĉiutage legi en iu bohema gazeto artikolon aŭ notizon pri nia afero. El la ĉiutagaj gazetoj de Praha sole granda ĵurnalo »Národní Listy« ne akceptadis sciigojn pri esperanto, sed oni povas esperi la ŝanĝon; almenaŭ la deputitaro de *Bohema asocio esperantista* (Dro Kamaryt kaj Bouška), kiu prezentis al la ĉefredaktoro la plendon pri tiu ĉi fakto, ricevis la aserton, ke la malakcepto okazis sole pro manko da loko, tute ne pro malfavoro al la afero, kaj ke oni ĉiam akceptos sciigojn de BAE por publikigi. Oni vidas, ke la mediumo estas neniel malbona. Ni laboru kaj ni certe sukcesos! *H. K. Bouška.*

La apudmaraj vinoj estis jam en Roma tempo tre famaj. La imperiestroj romanaj havis en regionoj apud Adriatika maro proprajn vinberejojn, precipe ĉirkaŭ Trieste, antikva Tergeste. La plej bona el apudmaraj vinoj estas „Terrano di Carso" (Kraški teran), kiu jam de l'antikvaj kuracistoj estis rekomendata al anemiuloj (sangmankuloj), ĉar ĝi enhavas multe da fero. La tero, en kiu Terrano di Carso kreskas, estas ruĝa kaj ferbrilanta. *R. N.*

KRONIKA A KOMENTÁŘ.

Schůze mezinárodního vědeckého svazu esperantistů v Drážďanech. »Internacia scienca asocio esper.« konalo za drážďanského kongresu

esperantistů dvě spolkové (pracovní) a jednu veřejnou (slavnostní) schůzi. Veřejná schůze konala se 21. srpna 1908 v aule techniky za předsednictví prof. dra Ad. Schmidta, přednosty magnetické observatoře v Potsdamu. Předsedající zahájil schůzi kratší řečí, v níž vytkl jako nejbližší cíl svazu vypravování odborné esperantské terminologie. O dosavadním stavu těchto prací podal zprávu R. de Saussure, docent matematiky na ženevské universitě. Po tom následovaly čtyři odborné přednášky. V přednášce *»O bibliografii esperanta«* generál *H. Sebert*, člen francouzského institutu popsal aplikaci decimálního třídění na bibliografii a sbírku všech publikací o esperantu i v esperantu, jak je založila a udržuje Centra oficejo esperantista v Paříži. *P. Dejean* (z Le Creusot) přednesl *»Návrh«*, aby v program prací svazu byly pojaty snahy pro zavedení jednotných měrných jednotek ve vědě i technice; k realisování těchto dosti starých, ale dosud nezdařených snah, doporučuje vydání esperantské příručky, obsahující seznam nejsprávnějších jednotek mezinárodních a jejich vztahy k ostatním měrným systemům (Návrh ten byl odkázán výboru). *Emil Belot* (z Paříže) zaslal referát *»Číselné vztahy mezi elementy slunečního systému a důkaz zvratné kosmogonie«*, který přečetl p. Rousseau. Na to *F. Rousseau* (z Bourg) promluvil o thematu *»Elementární geometrie založená na změnách polohy«*. Po těchto přednáškách následovalo několik poznámek o další činnosti svazu. Vedle této veřejné schůze konal vědecký svaz v Drážďanech ještě 2 schůze členské (17. a 19. srpna 1908), na nichž zvoleno představenstvo a výbor na rok 1908 9. Představenstvo zvoleno bylo takto: Čestný předseda dr. L. Zamenhof, předseda R. Benoit, ředitel mezinárodního ústavu pro míry a váhy v Sèvres u Paříže; místopředsedové prof. J. J. Thomson, profesor fysiky na universitě v Cambridge, inž. Nik. Kazi-Girey, správce čínské orientální dráhy v Charbinu (v Mandžurii), prof. Ed. Huntington, profesor na Havard University v Cambridge Mass (Spojené Státy), generální sekretář dr. R. de Saussure, docent matematiky na universitě v Ženevě, pokladník dr. Th. Renard, chemik v Ženevě. *Kamaryt.*

Doktorská dissertace o esperantu přijata byla (28. XI. 08) pařížskou medicinskou fakultou. Pojednání »Možnost a užitečnost pomocného jazyka mezinárodního v medicině« podal Pierre Corret. Komisse (profesoři Bouchard, Chantemesse, Rénon, Balthazard) uznala práci za velmi dobrou a projevila nepokrytě svůj zájem o předmětě pojednání, ba předseda komisse, vynikající autorita lékařská, prof. Bouchard, vřele projevil své sympathie esperantu. *Bšk.*

Nejvice kursů esperanta odbývalo se koncem minulého roku v Paříži, kde konalo se každého týdne 58 kursů (kromě toho v nejbližším okolí 19 dalších), v Barceloně (46), Londýně (38) a v Drážďanech (30). V Praze pořádalo se 12 kursů. *Hkb.*

Pátý mezinárodní kongres esperantistů konati se bude ve dnech 5.—12. září 1909 a bude asi jediným kongresem v tomto roce vzdor neprozřetelnému rozhodnutí drážďanského kongresu, aby se letos odbývaly kongresy dva. Aspoň předseda stálého výboru kongresového generál Sebert kabelogramem požádal americké esperantisty, aby letos od pořádání kongresu upustili, dr. Zamenhof projevil již pochybnost, že by mohl letos jeti do Ameriky, a také dr. Leon Zamenhof (bratr dra Ludvíka Z.) vyslovil se proti pořádání dvou kongresů ročně. Proto pravděpodobně Chautauqua (Šataokva) bude místem teprve šestého kongresu v roce 1910. A bude dobře tak. *Bšk.*

Třetí kongres německých esperantistů konati se bude ve dnech 20.-24. května 1909 v Gothě. *G. E.*

Účast důstojníků v organisaci esperantistů povolena byla také ministerstvem v Uhrách. *Nemo.*

Policejní ředitelství ve Vídni o esperantu vydalo zvláštní cirkulář, v němž pol. úředníky upozorňuje na důležitost esperanta. *Nemo.*

Výstava anglických výkresů získaných esperantem byla pořádána ve dnech 1.-3. ledna v dívčí měšťanské škole v Jevíčku. Tyto výkresy žáků londýnských elementárních škol zaslány byly výměnou za výkresy žaček jevičské měšť. školy. Vyjednávání o výměnu výkresů konalo se *esperantem*. Nyní se vyjednává o výměnu výkresů z průmyslových škol pokračovacích. *Jos. Grňa.*

Esperantské divadelní představení v Plzni uspořádal dne 12. pros. 1908 místní klub při svém přátelském večírku v sále Řemeslnické besedy; sehrána byla původní esperantská dvouaktovka »La gasto«, kterou napsala V. Vallienne; vstupné bylo 50 hal. *Kronikář.*

České přednášky o esperantu. — V Pardubicích »Vzdělávací klub« pořádal 17. prosince 1908 večer přednášku o esperantu v kavárně Střebský; po přednášce, kterou proslovil gen. sekretář »Svazu čes. esp.« p. dr. Kamaryt, rozpředla se dle pěkného zavedeného zvyku čilá debata, které súčastnili se hlavně pp. dr. Theim, prof. Roubal, uč. Košťál, Tůma a m. j. — V Litomyšli přednášel 10. pros. 1908 več. p. far. Kučera z Mikulče; přednáška uspořádána byla péčí spolku paní a dívek v malém sále Smetanova domu. — V Chrudimi spolek paní a dívek uspořádal přednášku o esperantismu 14. listopadu v sále musea; přednášel p. dr. Fousek. — V Hostomicích pojednal o významu esperanta p. Vohnout na přednášce 8. list. 1908. — V Mladé Boleslavi pořádala přednášku jednota »Sokol« (6. pros. dop.); promluvil p. Procházka. — V Čes. Brodě přednášel 6. pros. v sokolovně p. Kühnl. — Ve Mšeci promluvil o esperantu p. uč. Volák. *Kronikář.*

Veřejné kursy esperanta pro Čechy. — V Praze v Klárově ústavě slepců vyučuje p. uč. Macan ve 2 odděl. chovance ústavu. — V Prostějově zahájen byl 11. pros. 1908 v místnostech obecné školy (Palackého ul.) kurs vedený p. prof. Fridrichem; poplatek 2 K. — V Hostomicích p. B. nově založený (29. list. 1908) klub esp. zahájil kurs vedený pp. Křepelkou a Halbhubrem. — V Červ. Kostelci vyučují esperantu slč. Šupichová a p. Netval. — V Tišnově učí p. uč. Teplý. — Ve Vídni řídí kurs esperanta p. Macháček; vyučuje se v sob. več. (½8—½9); schůzky jsou v Schopenhauerstrasse 4 (Vídeň VIII.). *Kronikář.*

INFORMACE A DOKUMENTY.

Obchodní sekce S. Č. E. upozorňuje obchodní kruhy, že obstarává esperantské překlady dopisů, insertů, cirkulářů a pod. (menší zdarma, větší za mírný honorář), odporučuje korespondenty znalé esperanta, sprostředkuje inserci v esperantských časopisech, dodává těm, kdož užívají esperanta velmi levně vkusná razítka s esperant. hvězdou a s textem „Oni korespondas en esperanto“ a podává veškeré informace, týkající se obchodních styků s cizinou pomocí esperanta. Veškeré zásilky týkající se sekce přijímá jednatel sekce p. JUC. Barvíř (Praha-II, Růžová 1) neb generální sekr. Svazu čes. esper. dr. Kamaryt (Praha-VI, Albertov). *O. S.*

Klub českých esperantistů v Brně na své valné hromadě, konané 6. prosince 1908, o níž referát přineseme v čísle příštím, usnesl se vystoupiti z »Unie čes. esp.« a přistoupiti za člena »Svazu čes. esperantistů«. Významné rozkodnutí, které zasluhuje pozornosti. *Rd.*

LIBROJ KAJ GAZETOJ.

Praktična obuka u esperantu sa rječnikom. Sastavio *Mavro Spicar.* Zagreb 1909. U vlastitoj nakladi. Cijena K 2·60 (Pĝ. 102). — Per tiu ĉi unua lernolibro pri esperanto por Kroatoj s-o Špicar donas bonan apogilon por propagando en la nacio, kiu tiel longe staris ekster nia movado. La libro enhavas antaŭparolon pritraktantan la problemon pri la lingvo internacia, plenan gramatikon kaj sintakson, multajn ekzercojn kaj ambaŭ vortarojn, sekve ĉion, kion la komencanto bezonas por posedi nian lingvon. Per eldono de tiu ĉi libro certe plifortiĝos inter Kroatoj la intereso pri nia lingvo, vekita de s-oj Špicar kaj Devčić. Ni deziras al s-o Špicar, ke lia laboro estu rekompencita per granda disvastiĝo de lia verko, kiu meritas ĉian subtenon. *Bšk.*

Internacia scienca revuo. Oficiala monata organo de la *Internacia scienca asocio esperantista.* Red. kaj adm.: Genève, rue Bovy-Lysberg, 8, Svislando. Jara abono 2·75 Sm. — Jen la plej grava kaj signifa revuo esp., eldonata kun patronado de kelkaj eminentaj scienculoj kaj sciencaj societoj, zorge redaktata de prof. R. de Saussure, enhavanta grandan nombron da artikoloj, notizoj kaj analizoj pri la plej diversaj temoj natursciencaj, teknikaj, filologiaj, historiaj k. s. — En la lasta n-o de 5-a jarkolekto (N-ro 60) estas tradukitaj artikoloj de L. Moissenet »Unua internacia kongreso de la Vojo«, de prof. J. F. Kemp »Pri la antikvega disvolviĝo de la terglobo« kaj de Ad. Moynier »Raporto de la internacia komitato de la Ruĝa kruco«. Originala estas art. de D. H. Lambert »Vortoj kaj Ideoj«. En »Notoj kaj informoj« estas nekrologio de Čejka pri eminenta bohema kuracisto kaj sciencisto prof. Dro Eiselt. *Bšk.*

Lingvo internacia. Centra organo de la esperantistoj eliranta la 15-an de ĉiu monato. Red. kaj adm.: Paris, rue Lacépède, 33, Francujo. Abonpago (kun literatura aldono) 3 Sm. — Tiu ĉi plej malnova gazeto redaktata en esperanto (fondita en 1895) estas unu el la plej influaj esperantaj organoj. Ĝi estas ĉefa defendanto de la unueco en niaj lingvo kaj movado kaj kontraŭstaranto de ĉia lingva ŝanĝo. — El tri lastaj n-roj de XIII. jarkolekto ni citas la artikolojn: Tradicio kaj evolucio (prof. Cart pruvas, ke lingvo por normale evolui devas havi aŭ tradicion aŭ fundamenton), Impresoj de aerfluginto, Kiamaniere ni pliriĉigos nian komunan vortaron, Unu jaron poste (la redakcio rememoras, ke antaŭ unu jaro ĝi donis la devizon: ni restu fidelaj), Evolucio kaj evoluciismo (parolado de prof. Le Monnier), Kelkaj konsideroj pri la esp. vortaro, ktp. En literatura aldono estas tradukita »Manon Lescaut« de Prévost. *Bšk.*

Voĉo de kuracistoj komencas sian II jarkolekton, kiu, juĝante laŭ la 1-a n-o, estos ankoraŭ pli riĉa ol la antaŭa volumo; precipe multenhava estas »Revuo scienca«, en kiu ni dezirus legi ankaŭ referatojn de bohemaj kuracistoj-esperantistoj, al kiuj ni denove rekomendas tiun ĉi organon. — El la 1-a n-o ni citas la artikolojn: Ĉu estas permesebla larĝa uzado de artefarita aborto kiel rimedo kontraŭ disvastiĝo de tuberklozo,

Ripozo dimanĉa de la kuracistoj, Internacia sekreto profesia de kuracistoj (tre interesa internacia enketo). *Bšk.*

Informaj raportoj en sia decembra n-o (II, 5) dediĉas artikolon al la jubileo de aŭstria imperiestro, rememoras la naskotagon (15. XII.) de Dro Zamenhof kaj anoncas (gratulon!), ke la organo de aŭstri-germanaj esperantistoj eliros monate. En »Diversaĵoj« ĝi publikigas »Publikan deklaron de la Bohema societo esperantista en Praha« rifutantan la mensogojn disvastigatajn pri tiu societo. — Legante la gazeton ni ne povas preterigardi la formojn de landnomoj uzatajn de la redakcio kaj ni permesas al ni atentigi la redakcion pri tio, ke ĝi prave uzas la formojn Aŭstrio, Moravio, ĉar ne ekzistas nacio parolanta lingvojn aŭstran, moravan, sed ke ĝi malprave uzas la formon Bohemio (se ĝi akceptas: Germanujo, Rusujo ktp.), ĉar ekzistas nacio parolanta boheme kaj ĝia lando estas sekve Bohemujo. Laŭ la sama vidpunkto malprava estas la formo Hungarujo, precipe kiam la redakcio akceptis la vorton »madjara« (kial ne magiara aŭ maĝara?) *Rd.*

La Spritulo. Internacia sessemajna gazeto por ŝerco humoro kaj satiro. Red. kaj adm.: Leipzig, Körnerstrasse, 31 p. (R. Bresch), Germanujo. Abonpago 1·20 Sm. — Estas sendube, ke bona satira gazeto esp. povus havi sukceson, precipe se ĝi lerte uzus ankaŭ ĉion, kio en nia rondo familia vokas la satiran vipon. Ni multe dezirus, ke »La spritulo« fariĝu tia bona satira gazeto internacia. — La n-ro (I, 4), kiun ni ricevis, enhavas kelkajn bonajn spritaĵojn kaj montras ŝatindan progreson rigardante tri n-rojn antaŭajn. *Hkb.*

Polica revuo. Monata organo de esperantistoj policistoj. Red. kaj adm.: Budapest, IX, Üllöi- ut. 59, IV, Hungario. Abonpago 2 K jare. — La 2-a n-o de tiu ĉi okpaĝa gazeto eldonata de s-o Marich mirigas la leganton, ke polica en la gazeto estas sole la titolo; ĝiaj artikoloj tute ne tuŝas la aferojn policajn kaj ĉiujn ni jam legis en »Verda standardo« de s-o Marich. Certe estus rekomendinde, ke la enhavo respondu al la titolo kaj s-o Marich estas sufiĉe lerta por kolekti la materialon fakan. *Hkb.*

Germana esperantisto en 1-a n-ro de la VI. jarkolekto publikigas la artikolon de prof. dro Förster »Internacia komuneco de la nombrovortoj kaj de la kalkulado«, en kiu la fama scienculo proponas uzadi en ĉiuj lingvoj tian manieron de kalkulado, kia ekzistas en esperanto kaj — kion kredeble la aŭtoro ne scias — en bohema lingvo. Vere la reformo estus tre utila, precipe en la lingvoj germana kaj franca. Al tiu ĉi n-ro estas aldonita interesa »Kompara tabelo de la gramatikoj de Esperanto kaj Ido«. *Bšk.*

Pola esperantisto. Monata organo de polaj esperantistaj societoj. Red.: Warszava, Marszałkowska 143. Adm.: Warszawa, Hoža 20, Polujo. Abonprezo: 2·10 Sm. — Tiu ĉi pol-esperanta revuo estas redaktata de komitato, kiu konsistas el la konataj esperantistaj verkistoj kaj la plej malnovaj propagandantoj, dr. Bein, Belmont, Brzostowski, prof. Dabrowski, Grabowski, Zakrzewski, dro Leon Zamenhof. Al ĝia kunlaborantaro apartenas multenombraj kaj lertaj verkistoj. Tion konstati certe sufiĉas por kredigi, ke la gazeto estas rekomendinda. — El la lasta n-ro (III, 12) estu cititaj: Vox in dezerto, Internacia helpa monsistemo, Ekspozicio kaj pola kongreso esperantista en 1909. *Bšk.*

Belga esperantisto. Monata revuo. Adreso: Van der Biest-Andelhof, Anvens, rue de l' Aigle 26, Belgujo. Abonpago: 1·80 Sm. — Ĉar organo de belgaj esperantistoj »Belga sonorilo« malfermis siajn paĝojn por ido, »Belga ligo esperantista« fondis la novan organon en lingvoj esperanta, franca kaj flandra. — Unua (duobla) n-ro de la revuo en du artiko-

loj (Nia programo, Belga ligo esp.) raportas pri la situacio en B. L. E., en kiu la plimulto da membroj proklamis sin fidela al Zamenhofa esperanto kaj la membroj kaj grupoj reformemaj eksiĝis. *Hkb.*

Rumana esperantisto. Oficiala organo de la *»Rumana esperantista societo«*. Red. kaj adm.: Bucuresti, J. C. Bratianu, 5, Rumanujo. Aponpago 2 Sm. — Tiu ĉi rumanesperanta ilustrata revuo eliras sesfoje dum la jaro kaj enhavas multenombrajn informojn pri juna movado esperantista en Rumanujo kaj fremdlando. — Ĉefaj artikoloj de 2-3 n-roj estas: Pri ĝ, ĉ kaj ŝ; Rumana nacia industrio; Pensoj de reĝino; Mi aŭdas vin (muzikaĵo), U. E. A. *Rd.*

La Holanda pioniro. Oficiala organo de la holanda societo esperantista *»La estonteco estas nia«*. Red. kaj adm.: Amsterodam, Binnen Bantammerstraat 11 (J. de Haan). Abonpago 1·50 Sm. — Tri unuaj n-roj de tiu ĉi bela ilustrata organo de holandaj samideanoj estas plejparte dediĉitaj por raportoj societaj kaj kronikaj kaj por priskriboj de la plej interesaj lokoj en Holando. En »Fremdula paĝo« oni legas artikolojn: Akvolando, La Dunoj kaj la Maro. *Rd.*

La Suno hispana. Adreso: Rafael Duyos, Valencia, Cirilo Amorós, 28, Hispanujo. Abonpago 1·20 Sm. — Laŭ la 59-a n-ro de tiu ĉi plej malnova hispan-esperanta gazeto estis jam komencitaj preparaj laboroj por kongresoj en Barcellona (5.-12. sept. 1909) kaj en Chautauqua (la dato ne estas ankoraŭ fiksita — kaj ni esperu, ke por tiu kongreso estos elektita la dato en 1910 malgraŭ la malprudenta decido de la lasta kongreso). *Hkb.*

Normanda stelo. Bulletin mensuel edité par le *Groupe esperantiste de Ruen.* Red. kaj adm.: Ruen, rue de la Vicomté, 41 (M. Liébard). Abono: 1 Sm. — Tiu ĉi grupa monata bulteno enhavas plejparte francajn artikolojn propagandajn kaj kelkajn esperantajn tekstojn por komencantoj. *Rd.*

La Londona gazeto. Oficiala organo de la *Federacio de la Londonaj grupoj esperantistaj.* Adreso: London, Fanshaw Street, Esperanto Printers (H. L. Trinks & Co). Abonpago: 6 p. por 4 ekz. — Malgranda monata bulteno de London'aj grupoj, kies membroj ricevas ĝin senpage. — La 3 n-o enhavas ekskluzive lokajn raportojn, inter kiuj la informojn pri 32 kursoj. *Rd.*

Originalaj esperantaj kantoj »Esperu« kaj »Mi amas vin« de bohema aŭtoro dro Rolfo Dezo (pseŭdonimo) estis eldonitaj de V. Kotrba (Praha II 200, Bohemujo), en bela 12-paĝa kajero, kiu kostas sole 1 K kaj estas aĉetebla ĉe Ferd. Boháček, Jevíčko, Moravio. Ambaŭ kantoj bonege taŭgas por riĉigi la programon de esperantaj amuzaĵoj kaj certe havos grandan sukceson. *Rr.*

Serio da trikoloraj vidajkartoj el Praha kun esp. teksto estas eldonita kaj vendata de »Esperantista konsulejo en Praha« (V. Riegel, Praha II, 1687). La tuta serio da 10 kartoj kostas 60 hel. (afrankite) kaj prezentas jenajn vidaĵojn: 1. Panoramo de Praha, 2. Ponto de Karolo IV. kaj Hradčany, 3. Reĝa kastelo, 4. Rudolfinum, 5. Bohema nacia teatro, 6. Somerkastelo Belvedere, 7. Fontano en reĝa ĝardeno, 8. »Sala terrina« en palaco de Valdštýn, 9. Insuloj kaj haveno en Vltava, 10. Vyšehrad. Dek kartoj (ankaŭ aparte aĉeteblaj po 6 hel.) kaj broŝuro de H. K. Bouška *»Slovakoj kaj Magiaroj«* (prezo 55 hel.) kostas kune 1 K (kun afranko). *Rg.*

Zodpovědný redaktor: Dr. Stan Kamaryt. — Nakladatel Ferd. Boháček, knihkupec. — Tisk »Politiky« v Praze.